2003-01

Oktobro 2003

ISSN 1612-7927

INA

INTERNACIA NATURKURACA ASOCIO

INA-kunsido en Gotenburgo

Nova libro

De INA-prezidanto D-ro Puramo Chong pri korea kompleksia akupunkturo en Esperanto kaj en la germana lingvo



Grandioza sukceso

INA-kunsido en Gotenburga UK

Ĉiuj seĝoj okupataj - kiu venis malfrue devis stari dum nia kunsido.

Ĉeestis ĉiuj vicprezidantoj. Bedaŭrinde mankis la prezidanto kaj la sekretariino, kiuj havis aliajn okupojn.

La kunsidon prezidis Harald Schicke, kiu tre koncize gvidis tra la ampleksa programo, ĉar ĉijare nia kunsido estis tro mallonga - nur 45 minutoj estis je dispono. Tion tre bedaŭris la pli ol 120 partoprenantoj el proksimume 40 landoj.

Pro tiu tempomanko la estraranoj estis ankau post la kunsido je la dispono de la interesuloj, kiuj havis ankoraŭ multajn demandojn.

La ĉefan prelegon pri “stabileco” faris Kees Ruig. Tute nova stilelemento estis la medita muziko je la komenco kaj fino de nia kunsido. Ankaŭ dum la prelego estis tempeto por mediti kun muziko.

Judita Rey-Hudecek intertempe disdonis niajn informilojn kaj parolis kun membroj kaj interesuloj.

Kunlaboro inter INA kaj UMEA

Ambaŭ organizaĵoj decidis kunmeti siajn fortojn kaj estonte komune organizi siajn konferencojn. Tiel la partoprenantoj povos elekti el vasta gama da naturkuracaj kaj okcidentmedicinaj temoj.

La aŭskultantoj atente sekvas la programon, kiu estis tre varia malgraŭ la tempomanko

Prezento de germanaj firmaoj Bartos kaj Spenglersan kaj libro pri sana manĝo

Dum la prelego de Kees Ruig

Fine partoprenantoj kaj estraranoj moviĝas por senstreĉiĝo post sidado

Salutparolo de la prezidanto

D-ro Puramo Chong

La homaj pensoj pri la naturkuracado multe ŝanĝiĝis dum la lastaj kelkdek jaroj, kaj homoj nun multe pli preferas naturmetodan kuracadon ol antaŭe.

La fonoj de tia fenomeno povas esti diversaj, sed unu el la ĉefaj kialoj estus, ke la kronikaj kaj degeneraj malsanoj de homoj pliiĝas malgraŭ la okulfrapa disvolviĝo de konvencia medicino.

Homoj ekkonscias, ke pure per ĥemiaj medikamentoj ne plene povas solvi siajn malsanojn, ĉar la malsanoj de modernuloj fariĝis multe pli komplikaj.

Estas vero, ke por la sano multe kontribuis la konvencia medicino, precipe en la kampo de kirurgio, diagnozo pere de scienca teknologio kaj sukurado.

Sed naskiĝis male multaj diversaj malsanoj kaŭzitaj de polucio de la urbaj atmosferoj, riveraj akvoj per kemiaĵoj, alivorte entuta malpuriĝo de la naturo kaj medio, kiun kaŭzis la disvolviĝinta industria socio. Kaj la konvencia medicino montris sian klaran limon en la kuracado de tiaj malsanoj.

Homoj do ekkonscias, ke la nuna paradigmo de nuna moderna medicino ne estas ĉipova, kaj ke por la konservado de sia sano oni bezonas novan aliron al la sanproblemo. Homoj tiel sin turnis al la naturkuracado, kiu emfazas ĝustan vivmanieron, naturan kuracforton por la homa sano.

INA estas la organizo fondinta jam antaŭ du dekojaroj por la homoj, kiuj interesiĝas pri naturkuracado. INA intencas interŝanĝi diversajn sciojn en la mondo rilate al naturmetoda kuracado. INA dediĉas pli da atento al la graveco de kuracforto de naturo por sanigi homan korpon, tamen neniel rifuzas la gravecon de nuna konvencia medicino, ĉar ambaŭ kontribuas por la sano en apartaj respektivaj kampoj.

Naturkuracado pli atentas la malsanulojn ol la malsanojn mem kaj pli gravigas preventon ol kuracadon de malsanoj mem.

Mi esperas, ke en tiu ĉi revuo vi trovos informojn, kiuj donos pli da utiloj por via sano. Sendube la sano estas la plej granda kaj grava problemo de la homo en la mondo.

D-ro Puramo Chong, prezidanto de INA

Kontaktu INAn

www.esp-ina.com

Prezidanto: puramo@korea.com

Vicprezidantoj:

Harald.Schicke@t-online.de
judita.rey@zg.tel.hr
Kees Ruig: int.trade@arnhem.kvk.nl

Sekretariino: ina-asocio@web.de

“Revolucio kontraŭ la ĉina akupunkturo”

La libro de INA-prezidanto D-ro Puramo Chong furoras en Esperantujo kaj la germanlingva mondo

“Kompleksia Medicino kaj Saama Akupunkturo” estas la titolo de la bele farita libro, kiu aperis en la konata eldonejo Kava-Pech, Ĉeĥio. Tiu libro servas kiel pontlibro por la tradukado al multaj aliaj lingvoj. Tiel ĝi perfekte plenumas la statuton de INA, kiu deziras disvastigi la konon pri naturkuracado mondvaste.

La libro servas por instrui la korean akupunkturon, kiu ja baziĝas sur la ĉina, sed kombinas la kvin-elementan-teorion kun la kompleksia teorio de Saam.

La rezulto estas mirige efika, sed multe pli facile lernebla akupunkturo. Ĝi uzas la 60 transportajn punktojn, kiujn jam opinis la ĉinaj klasikuloj la plej gravajn.

Tiuj punktoj ne havas indikojn, kiujn oni devus parkeri. Oni elektas ilin laŭ la kompleksio, kiun oni konstatas per pulspalpado multe pli facila ol la pulsodiagnozo klasike ĉina.

Anstataŭ 350 punktoj sur la meridianoj kaj ĉirkaŭ 300 kromaj en la ĉina akupunkturo kun ofte deko da indikoj kaj komplika pulsodiagnozo la korea akupunkturo havas do klarajn kaj gravajn avantaĝojn!

La libro havas 267 paĝojn, 16 tabelojn kaj 87 bildojn. **Por INA-membroj ĝi estas havebla je la rabatita prezo de eŭroj 25,00.**

La germana eldono estas la unua traduko, farita de INA-vicprezidanto Harald Schicke. Per la ISBN 3-89240-083-0 la libro estas havebla por eŭroj 50,00 en librovendejo aŭ per mendo al *info@mz-verlag.de*. INA-membroj ne pagas sendokoston.

Alilingvaj eldonoj (angla, rusa, ĉeĥa) estas en preparo. Se vi ŝatus traduki ĝin al via gepatra lingvo, bv. kontakti d-ron Puramo Chong: *puramo@korea.com*.



Kelkaj impresoj el la libro (jen la germana eldono)

Vicprezidanto de INA honorita

Vicprezidanto Harald Schicke estis invitita de la korea ministerio pri agrikulturo por partopreni la ginsengofestivalon en Gumsan, Koreio.

Tiu invito okazis pro lia “merito por informi germanojn pri korea ginsengo”, ĉar li konsilas interesulojn pri ginsengo.

Kial li faras tion? Pro Esperanto! Dum sia unua vojaĝo al Azio antaŭ 26 jaroj li konatiĝis kun tiu mirakla radiko, konata jam de jarmilo kiel “ĉionkuracilo” (tion signifas la botanika nomo *Panax* ginseng C. A. Meyer).

Koreaj esperantistoj vivantaj en Japanio donacis al li imponan ginsengoradikon, kiu dum multaj jaroj, konservita per alkoholo, staris sur la skribotablo de lia kliniko. Tiel ĉiuj liaj pacientoj konatiĝis kun korea ginsengo.

Multajn jarojn poste li konatiĝis kun sia nuna korea edzino, kiu gvidas en Germanio interretan vendejon por korea ginsengo (www.ginseng-laden.de). Ties klientojn li konsilas.

Jen estas agado, kiun INA deziras: disvastigi scion pri naturkuracado el unu lando en aliaj!

Ĉu vi ne ŝatus fari simile? Raportu pri vialandaj plantoj aŭ aliaj naturkuraciloj al INA kaj instigu aliajn raporti pri tio en sia lando. Tia agado povas kaŭzi multajn bonajn sekvojn: vi helpas al malsanuloj en aliaj landoj, al via ŝtato, al vi kaj fine al INA.

Skribu al: *ina-asocio@web.de*

Kio estas ginsengo?

Laŭ la okcidenta medicino ginsengo estas “adaptogeno”. Tio signifas, ke ĝi reguligas: kio estas tro, tion ĝi moderigas. Kio estas maltro, tion ĝi altigas.

Informojn pri ginsengo vi trovas en diversaj lingvoj ĉe www.insam.or.kr

Schicke rikoltas ginsengon. Tiu laboro estas por la laboristoj tre streĉa kaj simila al la rikolto de asparago en Germanio

En la bazaro por freŝa ginsengo en Gumsan. Tie oni trovas multajn diversajn kvalitojn. En la tuta urbo eblas aĉeti ne nur ginsengon, sed multajn aliajn naturkuacilojn.

✉ Leteroj de niaj membroj

Jen la leteroj de niaj membroj, kiujn ni je bezono iom koncizigas pro spacomanko.

Saluton el **Togolando**!

Mi deziras ekrilati kun via asocio por interskangxi ideojn, spertojn pri naturkuracado.

En Togolando ni havas asocion nomata “Centro de sercxado por la tradicia medicino” (C:S:M:T.) Ni sukcesis kuraci multajn malsanojn pere de la tradicia medicino. Ekzemple: menstrua doloro, fibromo, diabeto, lakso, epilepsio, streso…

Verdire kaj honeste parolante, la Togolandanoj estas tre spertaj pri la naturkuracado. Mi pretas respondi al vi cxiujn demandojn.

Kossi Super
P/A SOGNE Jaovi Theodore
I.E:P.D. ZEBE
B.P. 114 ANEHO
Togolando

Polando

Zbigniew CZUPKALLO
PL 24-220 Niedrzwica Duza

Mi interesiĝas antaŭ ĉio pri la influo de preĝoj kaj bibliaj legaĵoj al la psiko de la homo. Mi gvidas sanan vivmanieron.

Bulgario



Mi estas maŝininĝeniero, sed mi interesigĝas pri naturkuracado. En regiono de mia urbo Gabrovo estas multaj naturaj kaj kulturitaj kuracherboj kaj mi uzas kelkajn por gvidi sanan vivmanieron.

Bedaŭrinde mi ne havis eblecon partopreni INA-konferencon, sed mi ĝojus se vi akceptos tiun ĉi leteron kiel konfirmon de mia deziro konsideri min membro de INA.

Ivan Petrov
Bul.”Mogilev” 35, ap. 10
5300 Gabrovo, Bulgario

Bulgario

Mi estis membro de INA antau 15 jaroj. Mi interesiĝis kiel ordinara membro pri la naturkuraca vivo.

Mi ricevis kaj legis la bultenon. Mi eĉ korespondis kun s-ro Puramo Chong en Esperanto. Ĉio estis interese al mi. Mi legis interesajn materialojn. Nun en nia lando okazas ekonomiaj ŝanĝoj kaj mi ne plu korespondas eksterlande. Mi finis jam 70 jarojn kaj mia emeritsalajro egalas je 50 eŭroj monate! La mono tute ne sufiĉas. Malgraŭ mia deziro mi ne povus renovigi mian membrecon. Mi ĝous ricevi nur informaĵon pri INA. Mi dezirus mendi iun interesan libron pri la naturkuraca vivo. Tia estas la situacio.

Ivan Necev
ul.Car Simeon 9
7174 - Borovo, obl.RZ. Bulgario

Bulgario

Mi deziras aniĝi kaj tre interesiĝas de naturkuracado kaj kontaktoj kaj interŝanĝo de informoj. Ni kune estos pli fortaj!

Dimo Nerov Dimov
Jk "Levski" bl. Jagoda B - 31,
7200 Razgrad, Bulgario

Ĉeĥa Respubliko

Mi estas ĝojplena ke asocio de naturkukacistoj denove vivas. Mi volis partopreni ĝian agadon, sed en la sama tempo okazis 3-a Eŭropa Medicina Esperanta Konferenco en Hungara urbo Hódmezgvásárfely. Mi gvidis ĉeĥan delegacion kaj estis ekzamenanto de Yumeiho-terapio kiu ricevis diplomon jam de kvara grado. Mi ĝojas je revuo kun prelego de d-ro Puramo Chong pri akupunkturo Sa-am kaj diversaj informoj.

Khun Zdeník
Sladkovského 103
508 01 Hoĝice v Podkrk.
Ĉeĥa Respubliko
khun.zdenek@tiscali.cz

Madagaskaro

Mi kuracis mian maleolan sxvelon nur regule manĝante fruktojn. Tial sana senmedikamenta vivmaniero interesas min. Ĉu vi povos sendi al mi kelkajn foliojn pri tio? Mi antaŭdankas!

Ramanitra Henri
V-45 Hante-Ville
Antsahatriroa
101 Antananarivo
Madagascar



Sudafriko

Antaŭ iom da tempo mi havis kontakton kun Harald Schicke kaj jam dum sufiĉe longa tempo mi korespondas kun Saionji Masayuki.

Mi estas persono, kiu multe atentas pri mia sano, pro tio mi tre interesiĝas pri INA. Ĉu vi povas sendi al mi informon?

Mi ŝatus membriĝi, se vi sciigas al mi kiel.

Jan Strydom
P O Box 31186
Totiusdal
0134 Pretoria
Sudafriko
janstryd@mweb.co.za

Litovio

Mi deziras renovigi mian membrecon al INA. Mi deziras ricevi eldonaĵojn de INA, scii pri antaŭviditaj aranĝoj. Mi intencas partopreni laŭ miaj eblecoj en la movado de INA. Mi petas informon al kiu kaj kiom mi devas pagi membrokotizon.

Vaclovas Kalvaitis
Vilniaus 18A-4
3000 Kaunas
Litovio

Venezuela

Senliman dankon pro via letero, kiu nur ĉi momente alvenis en miaj manoj kaj tio okazis pro la krizo (preskaŭ kaoso!) en kiu estas Venezuelo.

Eble vi bone scias pri la grandega kaj multaspekta krizo en kiu vivas la venezuela popolo. La financoj de la lando estas parto de la krizo. La bankroto estas

ĉie. Malgraŭ la multaj malfacilaĵoj en Venezuelo la Esperanto-agado estas aktiva kaj fervora.

En nia organizaĵo ni havas malgrandan bibliotekon kaj por ĝi estas tute bonvenaj libroj en Esperanto pri cxiuj temoj. Ne gravas, se ili estas malnovaj kaj uzitaj. Ĉiuj libroj estas utilaj kaj vere mi antaŭdankas al tiuj samideanoj, kiuj povas helpi.

Tute sendube mi deziras fariĝi aktiva membro de INA. Kion mi devas fari? Ĉu vi eldonas revuon? Mi estas desegnisto, ĉefe pri karikaturoj. Kion vi diras pri tio?

David G.Valecillos V.
Calle 79 No 3C-72
Maracaibo-4002 (Zulia)
Venezuela

Brazilo

Mi estas homeopatia kuracisto. Mi tre interesiĝas kontaktiĝi kun vi por interŝanĝi spertojn kaj ideojn pri kuracado.

Mi partoprenas grupon kiu eksperimentas homeopatiajn medikamentojn.

Bonvolu kontaktiĝi kun mi por ke ni uzu Esperanton por intershanĝi konojn pri Medicino.

D-ro Leonardo Lara Ribeiro
leonardolararibeiro@bol.com.br

Kiel membriĝi en INA?

Tio estis tre ofta demando, kiun ni facile povas respondi:

Simple sendu al *ina-asocio@web.de* vian deziron kun kompleta adreso. Indiku, ĉu vi profesie okupiĝas pri naturkuracado (kaj tiukaze vian karieron) aŭ ĉu vi simple interesiĝas pri naturkuracado.

Aŭ plenigu la aldonitan aliĝilon kaj sendu ĝin al la indikita adreso.

La kotizo de INA estas 30 eŭroj jare por membroj el la A-landoj de UEA aŭ 15 eŭroj por la aliaj.

Kiel membro vi ricevas kvarfoje jare la INA-revuon. Tri estas malgrandaj eldonoj kiel tiu ĉi, la kvara okaze de UK estas multe pli ampleksa.

Krome vi ĝuas rabaton por la INA-konferenco kaj povas senkoste sendi demandojn al niaj naturkuracistoj. Por tiu celo vi povas uzi la gastlibron je *www.esp-ina.com* aŭ rekte sendi mesaĝon al la INA-prezidanto aŭ al vicprezidanto Harald Schicke. La retadresojn vi trovas aliloke en tiu ĉi kajero.

INA estas la oficiala organo de Internacia Naturkuraca Asocio

Eldonejo: MZ-Verlag Ltd.
Schoolbrink 12, D-27383 Scheeßel, Germanio. Rete: info@mz-verlag.de
www.mz-verlag.de

Ĉefredaktoro: Harald Schicke

Adreso de INA:
D-ro Puramo Chong
Kwangmyong-2dong 50-5
Kwangmyong-shi
Kyonggi-do - 423-012, Koreio

Abeloj kaj abelaj produktoj

(la unua parto)

En la nuna tempo oni ĉiam pli ofte legas pri kreskantaj kostoj de klinika kuracado, kiuj altigas la kotizojn por la asekurasocioj ĝis apenaŭ mezurebla grado. Oni legas pri kronikaj malsanoj, kontraŭ kiuj la tradicia medicino estas senpova, pri kromefikoj kaj missukcesoj de kemiaj preparaĵoj. Tute ne hazarda tial estas la strebo de ĉiam pli multaj homoj, serĉi naturajn metodojn, per kies helpo oni povas refortigi la korpon, konservi ĝin sana kaj ĉe bezono ankaŭ kuraci.

Abeloj produktas ne nur mielon. La mielo estas la plej konata produkto de abeloj. En preskaŭ ĉiuj kulturoj en la historio de homa civilizacio mielo validis kiel grava nutraĵo kaj parte ankaŭ kiel kuracilo. Tamen por la abeloj mem la aliaj iliaj produktoj estas eĉ pli gravaj

- la ĉefa nutraĵo de la abeloj - krom la nektaro - estas florpolenoj, kiujn la abeloj kolektas de floroj kaj portas en abelujon. En vaksoĉeloj tiuj florpolenoj estas fermentataj, rezulte de tio estiĝas tiel nomata abelpano aŭ pergao.
- por protekti la abelujon kontraŭ vento kaj bakterioj la abeloj kolektas propolison, per kiu ili fermsigelas ĉiujn fendojn.
- kontraŭ malamikoj la abeloj havas propran defendilon: abelvenenon. Ĝi estas mortiga por multaj malamikoj de abeloj - mortiga, tamen ĝi povas helpi al la homo.
- por konstruado de ĉelartabuloj la abeloj produktas abelvakson.
- por la nutrado de la abelreĝino ili preparas specialan nutraĵon tiel nomatan *gelee royale*.

Ĉiuj tiuj abelprodukoj havas bonefikon ne nur por la abeloj, sed ankaŭ por la homoj, pri kiu vi konvinkiĝos legante la sekvantajn ĉapitrojn.

Rosa Ebel
Krefeld, Germanio

Carl Spengler - svisa pionira kuracisto

Carl Spengler naskiĝis en la jaro 1860 en Davos. Post sia doktoriĝo en medicino li laboris multe pri tuberkulozo, malsano kiu tiutempe terure suferigis multajn homojn en Eŭropo.

Pro tio la mondfama germana kuracisto Robert Koch eksciis pri li kaj venigis lin al sia instituto en Berlino, kie Spengler laboris kun aliaj nobelpremiitoj, ekz. von Behring kaj Kitasato.

En 1895 Robert Koch transdonis al Spengler sian originalan tuberkulinon, kiun Spengler uzis por ampleksaj bakteriologaj studoj.

Spengler serĉis novajn eblecojn por la kuracado de la tuberkulozo. La de li produktitaj IK-medikamentoj (IK = imunkorpoj) estis la bazo de lia granda kuraca sukceso. Li konstatis, ke ili efikis en densa formo malforte, sed en maldensa tre forte. En 1904 li publikigis la rezulton de sia esplorado en la prestiĝa *Deutsche Medizinische Wochenschrift* (germana medicina semajna revuo). En 1911 aperis lia verko *Tuberkulose- und Syphilis-Arbeiten* (esploroj pri tuberkulozo kaj sifiliso), poste aperis la rezultoj de liaj esploroj pri kancero.

La ĉefa merito de Spengler sendube estis, ke li kiel unu el la unuaj esploristoj eltrovis la gravecon de la miksitaj infektoj je la kuracado de tuberkulozo kaj ĝia efiko je la tuta organismo kiel “maskita (kaŝita) tuberkulozo”, tio estas aliaj malsanoj, kies origino estas la infektiĝo kun tuberkulozaj bakterioj.

Pro tio li ekhavis dum la pluevoluigo de sia terapio la genian penson samtempe apliki aktivan kaj pasivan imunigojn. Tiu kombinaĵo efikis ankau tiam, kiam la aktiva imunigo pro la malforta defendopovo de la korpo ne funkciis.

Tiu kun granda sukceso kontraŭ tuberkulozo aplikata medikamento estis poste nomita **Spenglersan Kolloid T**.

Pro tiuj eksterordinare bonaj spertoj Spengler evoluigis aliajn miksitajn koloidojn, kiuj helpis je malsanoj, kiuj ofte rezistis je kuracadoj. Oni antaŭe ofte kuracis nur la simptomojn, sed la kaŝita kaŭzo kaj kun ĝi la malsano restis.

Tiuj sukcesaj medikamentoj akoraŭ ekzistas kaj estas vendataj de la germana firmao *Meckel-Spenglersan*.

La Spenglersan koloida imunkuracado efikas precipe je malsanoj kun nekonataj kaŭzoj. Interesa estas la aplikado: oni frotas kelkajn gutojn en la delikatan haŭto de la interna kubuto.

Pliaj informoj en diversaj lingvoj estas haveblaj je *www.spenglersan.de*

Irisologio en Germanio (1)

Irisologio estas la supozeble plej ofte aplikata diagnozmetodo de germanaj naturkuracistoj. Ĝi estas aplikata ankaŭ en aliaj landoj, sed ofte kun diferencaj konceptoj.

Iom da historio

La okuloj sendube fascinis la homojn jam antaŭ miloj da jaroj. En Eŭropo unue Philippus Meyens en la jaro 1670 priskribis la speguliĝon de la korpaj organoj en la iriso. Daŭris ĝis la jaro 1886, kiam la hungaro Ignaz von Péczely eldonis la unuan mapon de la iriso.

Komence de la 20a jarcento diversaj germanoj evoluigis tiun mapon. Tamen ĝis hodiaŭ ne ekzistas unueca mapo.

Tio estas grava argumento de la multnombraj kritikistoj.

La baza ideo

En Eŭropo oni klarigas la ekeston de malsanoj per malboniĝo de la korpaj sukoj. Malbona nutrado kaŭzas mankojn, maltaŭgaj substancoj venenigas la korpon. La sukoj, tiuj estas sango kaj limfo, do veneniĝas.

La vojo al resaniĝo do ŝajnas tute simpla: se oni forigas la venenon kaj donas mankantajn substancojn, la paciento saniĝas.

Tamen restas la problemo, diagnozi la staton de la paciento. Por tio servas la irisologio.

Du bazaj kompleksioj

Ĉar ekzistas du sukoj, necesas ankaŭ du bazaj kompleksioj. Ĉar la sukoj estas sango kaj limfo, la bazaj kompleksioj estas sanguloj kaj limfuloj.

En meza Eŭropo ni havas brun- kaj bluokululojn. La brunokululoj estas la sanguloj, la bluokululoj (multe pli oftaj ĉi tie) estas la limfuloj.

La baza demando do estas:

Ĉu blua aŭ bruna okulo?

Tiel simple kaj tute sen iu ajn aparato oni povas konstati la bazan kompleksion.

Se oni vojaĝas en Eŭropo kaj eĉ al Afriko, oni facile konstatas, ke la homoj en la malvarmaj landoj precipe havas bluajn okulojn. Ili do estas adaptitaj al malvarmo. Ilia bezono estas produkti varmon. Tio havas sekvon por ilia metabolo. Ili rapide reagas al infekto, febras, sed rapide resaniĝas. Sed tio povas provoki troan reagon: tiel ekestas alergio. Ofte ili ŝvitas kaj la tiroido estas pli aktiva.

Limfuloj inklinas al disturbo de la regulado. La malsanoj estas ĝenaj, sed plej ofte ne organaj. Nur post pli longa tempo - se oni ne reregulas tion - sekvas organaj malsanoj.

Tipa simptomo estas la ŝvelado de la limfnodoj, kiun la okcidenta medicino forigas per operacio senkonsiderante, ke la kompleksio restas tute sama.

Brunokululoj aperas pli kaj pli en la pli varmaj landoj. Ilia problemo do estas forigi la varmon. Tio ankaŭ havas konsekvencon por ilia metabolo. Ĝi estas pli malrapida. Tial ili havas malpli da reguladaj disturboj, sed pli da organaj malsanoj.

Terapiaj konsekvencoj

Se la sukoj estas malbonaj, oni devas bonigi ilin, same kiel oni ĉerpas akvon el venenita puto ĝis la veneno malaperis.

Tiun koncepton oni ofte en Eŭropo troigis kun la sekvo, ke la pacientoj mortis.

En milda formo ĝi tamen estas ankoraŭ la plej grava kuracado de germanaj naturkuracistoj.

Diversigo de la kompleksioj

Ne eblas tiel simple dividi la homojn. La bazaj kompleksioj de limfuloj kaj sanguloj do diferenciĝas al diversaj subkompleksioj, kiuj tamen konservas la bazajn trajtojn.

En la iriso oni trovas la malfortajn organojn, kiuj pli frue ol la fortaj ekmalsanas.

Tiel irisologo rigardante la irison trovas la bazan problemon kaj povas ĝin kuraci - se tio ankoraŭ eblas.

Ĉar la germana ŝtata sanasekuro ne pagas por naturkuracistoj, multaj homoj venas tre malfrue al niaj klinikoj. Bonŝance ni tamen povas helpi al tre multaj inter ili.

Harald Schicke, naturkuracisto
Germanio

La (tro ruĝa) foto montras limfulon. La strukturo ĉirkaŭ la pupilo montras la digestajn organojn. En ties ekstera rando troviĝas la ventra nervosistemo. La ĉirkaŭa parto ĝis la rando de la iriso montras la ceterajn organojn.

La strukturo montras malfortecon de organoj, degeneron aŭ inflamon.

Tamen ĉiam necesas atenti, ke la plej multaj signoj estas genaj - ili montras eblecon de malsaniĝo, sed ne devon. Tio dependas de nia individua vivmaniero. Plej ofte ni do povas preventi gravan malsaniĝon.



Jen la sangulo, kiu havas malpli da strukturo. Tamen oni kun iom da ekzerco rekonas la strukturon ĉirkaŭ la pupilo.

Krome oni atentas la blankan parton de la okulo, la oftecon de la palebrumado, la vastecon de la pupilo kt.